É 100% Regular

Os verbos podem ser aprendidos em 10minutos.

Se tomar bom conhecimento, vai se apaixonar !

GISTO,FEB-2011
Str.Esperanto,880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas ottovaske@ibest.com.br.
Donace por VKafo-ĉeestantoj
Krom foraj loĝantoj, R$01,00

.....

PATRINA TAGO

Mi tre esperas ke la gegaŭĉaro ne perdis la bonŝancon partopreni en la ĉijara oportuno publikigi sian edifan penson pri la virino en la mondo, (08/03.2011) Limdato estis, 20.02.11.

Infre, eltirajxo el msg de BonaEspero:

Amikoj tre karaj Otto kaj Lenio,
kortuŝitaj ni estis legante viajn zorgojn pro la artikolo de Amri Wandel en la UEA revuo. Volonte ni volas komenti tiujn vortojn.
Sed unue ni sendas ĉefe al vi, Otto, kiel unu el la plej aktivaj ambasadoroj por atingi kontribuojn por fostoj la finan sumon de donacoj!
Ĉiumonate ni legas GISTON tre volonte kaj ridetas kaj ridas pro la bonhumuro de la redaktoro kaj la interesaj temoj. Gratulojn, Otto!

Entute la kontribuoj de nia kampanjo por fostoj sumas 13.386,04 euroj (28.110,79 brazilaj realoj) - vere eksterordinara helpo por ni, kiu plene solvas niajn problemojn.
Nur en Brazilo la sumo atingis 10.710,11 realoj. Bonege, ĉu ne?

FORPASOJ

Saŭdado kaŭzata de forpasintaj geamikoj, diligentaj samideanoj, estigas en mia memoro la nomojn de Paŭlo-Ereno, Elizabeth Diehl, ĉitiuj por ne paroli pri la veterano Karlo Dionizjo kaj aliaj. Kiu el la VK-rondanoj ne memoras ilin?
DM ricevas ĉiujn numerojn de la oficiala organo, la revuon Esperanto en kiu aperas etaj mencioj pri laste mortintaj esperantistoj tamen mi ne trovis la cititajn nomojn. Oni ja ne havas regularon pri kiu indas la publikigon de la nomo en tiu grava revuo, aŭ kiu esperantisto devas zorgi pri la sciigo al UEA de perdoj el niaj tranĉeoj. Laŭ mia privata opinio, pri tio devas zorgi la aktiva estraro en ĉiu verda komunumo, niakaze, GEA. Ereno estis nelacigeble helpema, ĉiam li puŝis novulojn al plilertiĝo; Elizabeth same nelacigebla en ornamado de aferoj rilataj al preparo de E-eventoj. Tre kara ŝi montriĝis ĉefe dum Ereno longe malsanis.

"U-BOAT 977"

Post ĉ.50 jaroj mi provas kompreni pli plene, ne sen "lambastono" la anglalingvan libron pri la submara milito(1945) en la Atlantiko. La verkinto estas la Ubot-komandanto, berlinano Heinz Schaeffer. Memorindaj eventoj en la finaj momentoj de la milito. Jen kelkaj el ĝiaj ĉapitroj: AirAttak, Gibraltar, Hell Underwater, Fuelling Under Water, Awaiting New Weapons, My Last Command, Sixty Days Under Water – Domaĝe mi ne plu posedas (pro pruntedono!) la librojn German Raider Atlantis kaj Defeat at Sea. Okazas tiklaj kaj tremigaj dentmontraj kunfrontiĝoj 300m sub la marsurfaco kaj tondrado far Ubot-ĉasaj fregato aŭ korveto kaj atako per profunda bombado! Leganto vibras kaj suferas kvazaŭ li estus unu el la skipanoj. Etoso komparebla al flugistoj, per aerŝipo enirinta en CB*, suferantaj atakon de fulmoj, tondrado, pluvego,

hajlo kaj vertikalaj ventoj, kaŭzantaj fortan skuadon! Tiam oni pensas: kial mi metiĝis ĉitien, se estas pli karese sidi ĉe panjo kaj trinki tason da kafo. -*CB=Kumulos-Nimbos.

MI RAKONTU ION LEGINDAN?

Jes ja sed, mi estas neniu Ĵurandir aŭ Karl-Maj, el kies pensejo senhalte fluas mirindaĵoj. Ĉu vi iam legis Karl-Maj? Bela rakonto lia estas en libro titolita "Tra la Kordilero de Kurdistan".La libro profunde impresis min, ne pro liaj aventuraj kaj sukcesaj bravaĵoj (eble fantaziaj) dum renkontiĝoj kun tieaj bravuloj kaj iliaj fanfaronaĵoj. Plej elstaras lia profunda amikeco al sia arabosanga ĉevalo, inteligenta kaj bele dresita. Ili ambaŭ longe vojaĝis kune tra impona montaro kaj valoj. Ĉe la fino li rakontas kiam la ĉevalo malsaniĝis. Etajn detalojn mi ne redonas ĉar mi legis la historion antaŭ 50 jaroj tamen neforgeseble kortuŝajn scenojn Karl-Maj rakontis. – Eble tial ke, mi militservis en kavalerio, (dum unu jaro *mia ĉevalo* nomiĝis Karoso) la priĉevalaj aferoj tre altiras min. Rompas mian koron sceno en kiu aĉulo mistraktas beston, ĉefe sian ĉevalon. Domaĝe ĉie troveblas amaso da ili!

PROPONO

Multpruvite ke Gisto-legado iel utilas al la E-movado kaj ke la periodaĵo devus ne finiĝi post kiam la nuna redaktanto (87j) forpasis, mi proponas ke, laŭvice unu el la kremo de VK-anoj surŝultrigu la "pianon" kaj iam pretigu du paĝan tekston Gisto-formatan, laŭ sia gusto kaj sendu ĝin al :ottovaske@ibest.com.br

Bv rideti.

ĈU LABORO AŬ AMUZO?

Prezidanto de granda organizaĵo, edzo de tridek jaroj, ricevas socialan enketilon kies unu ero postulas deklari sian opinion, ĉu plenumi enhejmajn edzajn devojn, inter ili kompreneble konsiderendas ankaŭ la enlitajn aferojn – ĉu ili estas laboro aŭ amuziĝo?
Por povi respondi ene de averaĝa opinio far pluraj viroj, li faras la saman demandon al siaj multaj subuloj, inter ili eĉ al juna ĵus dunkita pedelo. Ĉi-lasta ne palpebrumis antaŭ ol respondi: aĥ, se tio estus laboro, mi jam estus ricevinta ordonon fari tion.

MEMORIGO (el JH)

Du amikoj renkontiĝas surstrate.
Holala, kara amikego, de longe ni ne intervidiĝas, kiel vi fartas? – Bone kaj nuntempe mi surpaperigas miajn vivmemorojn.
-Grandioze!...sukcesojn al vi. Ĉu vi jam atingis la momenton kiam mi pruntedonis al vi du mil realojn?

NAZO

Edziĝonta junulo el tre riĉa familio komisiis svatiston. Li deziris ne akiri "katinon en sako" tial li postulis vidi la fraŭlinon sen vestoj. La gepatroj rezistis sed volis ankaŭ ne perdi la valoran partion kaj fine konsentis ke la filino nudiĝu antaŭ la estonta bofilo. Ĉi tiu, post longa esplorado deklaris: mi ne volas edzinigi ŝin.al mi Ŝia nazo estas tro granda.

MINIMUMO

El babilado de du judoj. --- Mi konstruigas domon. – Bonege, kiom da ĉambroj?
- Unu.
Nu, vi pravas, malpli da ĉambroj ne havas senson.-